4e Jaar n° 7 Maandblad. Juni 1945.

P A C O kaj J U S T E C O

Orgaan der E°-beweging:
"Paco kaj Justeco" BRUGGE.

Voorzitter : Drs. F. ROOSE - J.& M. Sabbestraat,12,-BRUGGE.
Advertentie: Secretariaat: ROOSE - DE KERSGIETER,
J.& M. Sabbestraat,12,-BRUGGE.
Propaganda : Fons NORRO, Coupure, 33,-BRUGGE.

Postrekening nr 479170 van DE KERSGIETER H.,
J.& M. Sabbestraat, 12,-BRUGGE.

()()()

Se oni ekzemple juĝas ke A = B, aŭ la du estas absolute la samaj kaj do ne estas juĝo sed simpla taŭtalogio, ĵus kiel oni dirus A = A. Aŭ la du ne estas absolute la samaj kaj tiam la juĝo estas erara. Ĉar oni ne povas identigi du malsamajn aĵojn aŭ ecojn; oni ne povas diri A egalas al B.

Ne, kontraŭ la silogismo. Silogismo konsistas en tio-ĉi ke oni komparas du aĵojn aŭ ecojn al unu tria aĵo aŭ eco por vidi ĉu estas identeco aŭ malsamameco inter la du unuaj. Ekzemple: se A = B
kaj se B = C
tiam A = C

aŭ se A = B
sed se B ≠ C
tiam A ≠ C.

Konkreta ekzemplo: ĉiuj trafikiloj (B) = utilaj (A)
tramo (C) = trafikilo (B)
tramo (C) = utila (A)

La unuan juĝon en tiuj tri oni nomas "Major". La dusan oni nomas "minoro". Kaj tiam venas la tria kiu estas la "konkludo". La skeptikuloj diras ke per la silogismo oni ne venas al nova malkovro de vero. Oni tuts-simple ne venas al vero, al absolute certa vero. Ĉar la "major" estas ĉiam la konkludo de alia silogismo. Efektive en iu silogismo la konkludo estas vera. Sed kiamaniere vi scias ke la "major", sur kies vereco ripozas la vereco de la konkludo, estas vera ? Evidente ĉar tiu major estas mem la konkludo de alia antaŭe farita silogismo. Bone, do antaŭe ni faru tiun silogismon. Sed jen kion ni vidas! En tiu nova antaŭe farenda silogismo, kiu kompreneble ankaŭ devas havi "major" kaj "minor" kaj "konkludo", la "major" estas denove la konkludo de ree antaŭe farenda silogismo! Kaj tiel senfine! ĉiam en kiu ajn silogismo la "major" estas la konkludo de alia antaŭe farenda silogismo. Kaj alflanke ne eblas tion fari senfine. Oni devas ĉe halti. Do ĉe iu momento oni devas allasi iun "major" kies vereco ne estas pruvita, do ne absolute certa. Sed nun nia skeptikulo venkas en la batalon! Sur tia major vi konstruas konkludojn! Tiuj konkludoj do ankaŭ ne estas certaj! Kaj tiel la silogismo ne konduku nin al vero. Eble vi diras en vi mem, kara leganto, "Nu, oni ne uzu ofte la silogismon". Sed la malfeliĉo konsistas en tio-ĉi ke oni kapablas uzi aur la silogismon. Ne ekzistas alia ~~xxxxxxxxxxxxxxxxxxxx~~ rezonmaniero. Diru kion ajn, oni ĉiam povas demandi al vi sur kio vi bazigas por diri tion. Kaj jen, vi venas vole nevole en la silogismo. Se vi diras ekzemple "estas hodiaŭ bela vetero" aŭ "Cercle venkis kontraŭ Club" aŭ mil aliajn juĝojn, oni ĉiam povas demandi al vi:"el kio vi konkludas ke estas hodiaŭ bela vetero? kaj ke Cercle venkis kontraŭ Club?" Kaj tiam vi vidos ke via juĝo estis konkludo el silogismo (ekz: kiu faras plej da celpunktoj tiu venkas, Cercle faris plej da celpunktoj; do: Cercle venkis). Al la jam grave vundita silogismo la skeptikuloj donas ankoraŭ fortan baton. La skeptikulo diras: la silogismo estas (kringloop = cercle vicieux) cirkloiro. Do iro senfino, do sen rezultato. La "major" kaj la "minor" estas ankaŭ nomataj la premisoj. La konkludo, kiel ni jam vidis, ripozas sur la premisoj. Sed la unua premiso ripozas ankaŭ sur la konkludo. Do la konkludo (tio kio devas esti pruvata) ripozas sur la premiso kies vereco ripozas sur la konkludo (kiu ne ankoraŭ estas pruvata; kaj poste pruvata sur la major!). Ni vidu kiel ekzemplon la silogismon:

unua premiso: major : ĉiuj trafikiloj estas utiloj.
dua premiso: minor : tramo = trafikilo.
konkludo: tramo = utila.

Estas evidente ke la konkludo ripozas sur la du premisoj. Sed mi demandas al vi, sur kio ripozas la unua premiso ? Sur la konkludo! Ĉar estas kompreneble ke vi ne rajtas diri ke ĉiuj trafikiloj estas utilaj se vi ne antaŭe scias ke la tramo estas utila. Jen vi estas en cirklo el kiu vi ne kapablas eliri.

Post kiam la skeptikuloj tiel mortbatis la racion ili ankaŭ neniigas la valoron kaj la taŭgecon de la konsentoj. Kiamaniere oni povus fidi al la konsentoj por havi objektive fundatan kaj certan konon pri ĉio kiu ekzistas. Estas konata fakto ke niaj konsentoj malsimilas al tiuj de la bestoj. La okuloj de tre multaj bestoj tre tre malsimilas. Do ili vidas la mondon alie ol ni vidas ĝin. Do la mondo estas por ili alia ol pór ni. Kio garantias ke la mondo kiel ĝi aperas antaŭ niajn okuloj estas la ĝusta mondo, la vera apero de la mondo tia kia ĝi estas?